



# Informal Bulteno

ITALIA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071

REDAKTORO: Gimelli p. l. Germano

N° 7 -

Julio 1957

7-a Jaro

XXVIII CONGRESSO NAZIONALE7° CONVEGNO DEI FERROVIERI ESPERANTISTI ITALIANI

Varese, la ridente città-giardino lombarda, sarà dal 21 al 25 settembre p.v. la sede del Congresso Nazionale Esperantista.

La felice scelta della località e la capacità organizzativa dei samideani locali sono certamente di buon auspicio per la migliore riuscita della manifestazione. Le adesioni sono aperte e vanno inviate al Dott. Ing. G. Caraffa, Via Saacco 14, Varese, unitamente alle quote fissate come segue:

Iscritti alla F.E.I. §. 1200, familiari e giovani §. 600, non iscritti alla F.E.I. §. 1500. Per gli stranieri e per i diaohi l'iscrizione è gratuita.

Il comitato organizzatore ha già predisposto il programma di massima come appresso indicato:

Sabato 21-9 : "Interkona vespero" in un locale caratteristico;

Domenica 22 : mattina: S.Messa in Esperanto - Inaugurazione Ufficiale;  
pomeriggio: Assemblea Generale della F.E.I. - 7° Convegno I.F.E.A.  
sera: Ballo ufficiale;

Lunedì 23 : mattina: Esami di Esperanto e proseguimento dei lavori del Congresso a Sezioni separate;  
pomeriggio: Assemblea dell'Istituto Italiano di Esperanto - Visita alla città e dintorni, ed a stabilimenti locali;  
sera: Manifestazione di arte varia;

Martedì 24 : mattina: Conclusione degli esami di Esperanto;  
pomeriggio: Gita al Sacro Monte ed al Campo dei Fiori;

Mercoledì 25: Escursione sul Lago Maggiore in battello, che penetrerà nelle acque territoriali svizzere e costeggerà la costa piemontese fino ad Intra, Pallanza e le Isole Borromee, con visita all'Isola Bella. Dopo breve sosta a Stresa, si proseguirà per S.Caterina del Sasso fino a Laveno da dove, in pullman, si farà ritorno a Varese.

Nel quadro del Congresso Nazionale avrà luogo nel pomeriggio di domenica 22 settembre alle ore 17 il 7° Convegno annuale della "ITALIA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO" (I.F.E.A.). De al niaj anoj ĝis revido en Varese.

SOMBRAJ RESTADOJ EN KASTELO GRESILLON

BAUGE (Maine et Loire) - Francujo

Ĉi tiun jaron la programo de la someraj kunvenoj estas la jenaj:

- 1/6 - 14/7 : Renkontiĝoj - Kursoj por komencantoj - Blindkursoj - Feriaj restadoj  
14/7 - 24/7 : Sensacia internacia renkontiĝo kun eminentaj samideanoj: D-ro Lapenna, Prof. Waringhien, Ing. Watier, D-ro Albault k.t.p.  
25/7 - 10/8 : La franca lingvo instruata al diverslandanoj pere de Esperanto.  
30/8 - 31/8 : Somera lernejo - Kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

Fervojistoj, memoru ke la Kastelo Gresillon estas propraĵo de la Esperantistoj, kaj helpu ĝin daŭre prosperi. F.F.E.A.

42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MARSEILLE = 3 - 10-aŭgusto 1957 = FRANCUJO

Adreso: 32, Cours Estienne d'Orves, Marseille, Francujo. Telografo: Esperanto.  
Banko: James Rosa, Marseille. Ĝirkonto: Groupe Esperantiste, Marseille n° 156-15.

SUB LA PROTEKTADO DE S-ro RENE! COTY, PREZIDANTO DE LA FRANCA RESPUBLIKO

N-ro 9

OFICIALA KOMUNIKO

Junio 1957

Nova kunsido: Anoncis fakkunvonon: "Veterana Esperanto Klubo".

Urba vizito: La firmao Nestle invitas 80 kongresanojn al vizito en Marseille de sia plej moderna eŭropa fabrikejo. La vizito okazos dum la kongresa jaŭdo, ekskursataĝo. Interesuloj bonvolu anonci sin per poŝtkarto al la Kongresa Oficejo.

Aliaj vizitoj: Kongresanoj, kiuj deziras partopreni en la senpaga ŝipvizito de la Haveno aŭ en la faka vizito al la radio-televidaj instalaĵoj de Marseille bonvolu anonci sin per poŝtkarto al la Kongresa Oficejo.

Unutaga koverto: La Kongreso eldonos kovertojn kaj ilustritajn poŝtkartojn kun oficiala unutaga poŝtstampo pri la Universala Kongreso:

- 10 kovertoj afrankitaj 15 fr. (ordinara afranko por leteroj en Francujo) = 540 fr.
- 10 kovertoj afrankitaj 30 fr. (afranko por eksterlando) = 630 fr.
- 10 ilustritaj poŝtkartoj afrankitaj 12 fr. (kun teksto en Esperanto) = 540 fr.
- 10 ilustritaj poŝtkartoj afrankitaj 18 fr. (kun teksto en Esperanto) afranko per eksterlando = 630 fr. La unutagaj kovertoj kaj poŝtkartoj, estos vendataj ankaŭ al la filatelista merkato.

Gazetara servo: La Kongresa Gazetara Servo, internacia branĉo, disponigos al kongresanoj kaj esperantistoj neĉeestintaj en la Kongreso laŭelekto unu el la subaj artikoloj por traduko en nacian lingvon kaj por aperigo en taŭgaj gazetoj:

- "Tutmonda Kongreso sen interpretistoj" (S-ro G.C. Fighiera).
- "Lingvoj kontraŭ scienco" (D-ro Waysblum).
- "Instruistoj kaj la Internacia Lingvo" (S-ro J. Beau, Agregacia Prof.).
- "Lernejo kaj moderna universalismo" (F-ino J. Dediou, lingvo-instruistino).
- "La lingva problemo en la Eŭropa Federacio" (D-ro W. Herrmann, gvidanto Eŭr. Kon.).
- "Rotary kaj Esperanto" - "Esperanto kaj Katolikismo"

La serio estas daŭrigota. Mendinte artikolon citu la gazeton en kiu ĝi aperos.

Nekongresanoj aldonu du respondkuponojn.

Teatraĵoj: Pro lokaj malfacilaĵoj, la L.K.K. decidis, ke anstataŭ "Topaze" de Pagnol kongresa teatraĵo estu la komedio de Molière "Georgo Dandin", ludata de la Esperantista Teatra Trupo de Barcelono gvidata de S-ro Francisc Vilà.

Morala kotizo: Interkonsente kun la Estraro de U.E.A., la L.K.K. decidis starigi moralan kotizon por tiuj esperantistoj kiuj, malhelpataj partopreni en la Kongreso, tamen deziras ricevi la kongresajn libron, insignon kaj aliajn dokumentojn kaj finance subteni la ekonomion de la Universala Kongreso. La Loka Kongresa Komitato apelacias al la esperantistoj kaj al la esperantistaj asocioj en la tuta mondo multnombre morale aliĝi. La kotizo estas 1000 francaj frankoj.

Statistiko: (ĝis fino de majo) Alĝerio 4, Aŭstrujo 22, Aŭstralio 1, Belgujo 15, Brazilo 4, Britujo 69, Bulgarujo 28, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 26, Finnlando 10, Francujo 368, Germanujo 95, Grekujo 1, Hispanujo 36, Hungarujo 2, Italujo 116, Izraelo 1, Jugoslavio 48, Japanujo 2, Kongo Belga 2, Maroko 14, Meksikio 2, Monaklando 3, Nederlando 42, Norvegujo 14, Novzelando 4, Pollando 8, Portugalujo 5, Rumanujo 2, Sudafriko 2, Svisujo 23, Svedujo 120, Turkujo 2, Usono 6, Venezuelo 1. Entute 1103 el 35 landoj.

Gian Carlo Fighiera - Konstanta Kongresa Sekretario

Okaze de la U.E.A.-kongreso en Marseille la franca sekcio de I.F.E.F. organimos fakan kunvonon al kiu ŝiu fervojista kongresano estas invitata. Laŭ la klopodoj jam faritaj de la L.K.K. la kunveno okazos la 5-an aŭ la 6-an de aŭgusto. En la programo ni antaŭvidas la viziton al la turniganta ponto de Caronte.

F.F.E.A.

Grava Informo!

MORALA ALIĜO AL LA U.K. EN MARSEILLE

La L.K.K. kaj la K.K.S. faris ĉion eblan, por ke la Universala Kongreso en Marseille estu labora, interesa, amuza kaj ĉiurilate alloga. La aprobita programo promesas vere altnivolan semajnon en plej agrabla atmosfero.

Malgraŭ tio, la nombro de aliĝintoj estas relative malgranda. Kvankam sendube multaj aliĝos en la lasta momento, tamen tute certe en Marseille, ne estos tion da kongresanoj, kiom estis en Kopenhago. La kaŭzo verŝajne estas, ke la ĉi-jara kongresurbo situas ion fore. Konsiderante, ke tre probable multaj esperantistoj, kiuj ne povos persone ĉeesti la kongreson, deziras tamen ligiĝi kun la ĉefa jara manifestacio de la Esperanto-Movado, la Estraro de U.E.A., interkonsente kun la L.K.K., decidis enkonduki ĉi-jare specialan "Moralan Aliĝon" al la 42-a Universala Kongreso en Marseille. La kotizo por tiu-ĉi Morala Aliĝo estas 1.000 fr.fr. aŭ egalvaloro. La Morala Aliĝo ne rajtigas al partopreno en la aranĝoj de la kongreso, sed ĉiu kiu pagos la kotizon de Morala Aliĝo ricevos la Kongresan Libron kaj ĉiujn aliajn dokumentojn.

La kotizon por la Morala Aliĝo oni povas pagi aŭ al la L.K.K. per ĉirkonto Groupe Esperantiste, Marseille, N-ro 156-15, aŭ per la banko James Rosa, Marseille, aŭ al la kutinaj perantoj, kies adresoj estas publikigitaj en la oficialaj bultenoj. Kotizojn akceptas ankaŭ la Centra Oficejo de U.E.A., 7, Eendrachtsweg, Rotterdam C.

La Estraro estas konvinkita, ke multaj esperantistoj utiligos tiun-ĉi eblecon kaj subtenos per Morala Aliĝo nian ĉi-jaran Kongreson, havigante samtempe al si belan kaj valoran memorajon.

Prof. D-ro Ivo Lapenna - Ĝen. Sekretario de U.E.A.

R A D I O R O M A - E S P E R A N T O F A K O

DISSENDOJ EN ESPERANTO JARO 1957-a Casella Postale 320 ROMA (Italujo)

La dissendoj okazas de horo 18,55 ĝis 19,10 (M.E.T.)

Ondlongoj: metroj 30,90 = Mc/s. 9,71; metroj 41,24 = Mc/s. 7,27 kaj metroj 50,34 = Mc/s. 5,96.

Prelegantoj: mardo: alterne S-ro L. MINNAJA kaj Prof. D-ro V. MUSELLA

MERKREDE: S-ro Luigi MINNAJA kaj VENDREDE: Prof. D-ro Vincenzo MUSELLA

A Ŭ G U S T O 1 9 5 7 = a

- 786 vendredon la 2-an : La Sanktulino de la pureco: Maria Goretti
- 787 mardon la 6-an : Esperanta Parnaso: Francisco Valdomiro Lorenz
- 788 merkredon la 7-an : Kuriero de Esperanto
- 789 vendredon la 9-an : Italaj belartaj urboj: Verona
- 790 mardon la 13-an : Italaj artistoj: Michelangelo
- 791 merkredon la 14-an : Kuriero de Esperanto
- 792 vendredon la 16-an : Aŭgusto
- 793 mardon la 20-an : Novajoj el Italujo
- 794 merkredon la 21-an : Kuriero de Esperanto
- 795 vendredon la 23-an : La vojaĝarto
- 796 mardon la 27-an : La recepto pri bonhonor
- 797 merkredon la 28-an : Kuriero de Esperanto
- 798 vendredon la 30-an : Leterkesto kaj bibliografio

La Fakestro: L. MINNAJA

S V I S A R A D I O

Ni atentigas tiujn kiuj kutine aŭskultas la frendajn Esperant-programojn ke, jam de kelke da tempo, la vespera elsendo de la Svisa Radio (S.S.R.) ne plu okazas mardo kaj ĵaŭde, sed lunde kaj vendrede.

La tempoj de la elsendoj, do, estas: Lunde, h.18,30: Dr. A.Baur - Mardo, h. 12,55: Dr. A.Baur - Ĵaŭde, h.12,55: Prof. E.Privat - Vendrede, h.18,30: Prof.E. Privat. La ondlongoj estas: HER 3 6165 Kc. 48,66 m. - HER 4 9535 Kc. 31,46 m.

## RADIO SOFIA

La centra konitato de Bulgara Esperantista Asocio sciigas ke ekde la 2-a de junio ankaŭ Radio Sofia komencis regulajn dissendojn en Esperanto.

La dissendoj okazas ĉiudimanĉe dum 25 minutoj: je la 20 horo (Ondlongoj: 39,11 m. 7670 Khc, kaj 49,42 m. 6070 Khc.); je la 23,30 horo (Ondlongoj: 39,11 m. 7670 Khc. kaj 30,93 m. 9700 Khc.).

La programo enhavas temojn el kultura, socia, ekonomia, politika, muzika kategoria, k.t.p. La tutmondaj Esperantistoj estas invititaj esprimi siajn impresojn de la aŭdado de Radio Sofia kaj fari rekomendojn sugestojn, k.s.

## ESPERANTO - POŝTMARKOJ EN HUNGARUJO

La 9-an de junio aperis en Hungarujo du novaj poŝtmarkoj dediĉitaj al Esperanto, eldonitaj okaze de la 70-jara ekzisto de Esperanto, koincide kun Esperanto-Ekspozicio aranĝita en la plej granda kulturdomo de Budapeŝto. En la ekspozicio funkciis poŝtoŝtampo, kiu uzis memorstampojn.

Ni ricevis de nia kolego D-ro Stefano Bácskai, la du poŝtmarkojn algluitajn sur la unutaga koverto kun la specialaj memorstampoj, kaj povas prezenti ilin alvi:

La unua marko valoranta 60 filerojn, havas ruĝbrunan koloron kaj simbolas la tutmondan parolon en Esperanto. La dua marko valoranta 1 forinton prezentas bonege desegnitajn portretojn de nia Majstro D-ro L.L.Zamenhof kaj havas verdan koloron. Ankaŭ markoj estas desegnitaj de la konata hungara grafikartisto Aleksandro Légrády.

La kvarangula speciala poŝtstampo enhavas krom la loko kaj la dato ankaŭ la vortojn "Esperanto lingvo internacia" kun la indiko de la jaroj 1887 kaj 1957. Sur la unutaga koverto estas videbla ankaŭ alia oficiala stampo dulingva: "Első nap - Unua tago". La markojn oni presis en unu miliono da ekzempleroj.

La eldono de ĉi tiuj poŝtmarkoj pruvas, ke la hungaraj oficialaj instancoj serioze deziras la pacan kunlaboron de la popoloj, instigas al pli bona interkonprenado, pli vasta kunlaboro helpas la progresajn novadojn, kaj ke ili komprenas kaj rekonas la valoron de Esperanto por tiuj celoj.

## NOVAJ JOJ EL HUNGARUJO

Nia hungara kolego Takács Lajos, pasintjare aliĝinta al I.F.E.F., jam rikoltis bonajn sukcesojn. Laŭ lia iniciato fondiĝis en la kadro de la fervojista kulturhejmo fakrondo esperantista kaj paralele ekfunkciis kurso por konencantoj kun 40 partoprenantoj, gvidata de nia kolego mem. Salutkartojn kaj gratulojn oni sendu al la fakrondo laŭ jena adreso:

Vasutasok Szakszervezete - Eszperanto szakkör. Vörös hadsereg utja 49 szàn  
DEBRECHEN, Hungarujo.

## K O R E S P O N D P E T O

Fervojista esperantista rondo ĉe la stacio Duisburg - Wedau, Germanujo, dezirus korespondanĉon kun kolegoj eksterlandaj (ankaŭ kun filatelistoj). Skribu multnombres: Petro Hermanns, Zur Wolfskull 43, Duisburg - Wedau, Germanujo